



monda solidareco

N-ro 113 - Majo 2015 - kvaronjara - 1.25 €

Gravas la kotizo !

« La aliĝintoj akurate pagu siajn kotizojn » ... « por ke dosiero estu elektebla, la koncernatoj devas esti pagintaj siajn kotizojn dum du plenaj jaroj », ... « la profitantoj el financado sin devontigas pagi siajn kotizojn almenaŭ dum la daŭro de la pruntepreno kaj de ties repago » ...

Sed, kio estas tiu kotizo?

Kiujn ĝi koncernas?

Al kio ĝi utlas?

Kial ĝi estas grava ?

Ĝenerale, kotizi estas kolekti monon por komuna elspezo.

Ĉe Monda Solidareco kontraŭ la Malsato, « kotizi » estas iom pli ol tio. Tio estas rimedo por provizi la kason cele al financado de aparta projekto. Ĉiuj partoprenas en la peno el kiu profitos unu grupo. Sed tio estas ankaŭ esti unu el la elementoj, kiuj konkuras en komuna laboraĵo, esti civitano kiu konscie, memvole kaj memdecide kontribuas en la progreso : ekonomia progreso ĉi tie aŭ tie, ebligi ekhelpon, kiu malfermos al iom pli da prinutra sekureco, sed ankaŭ elvolviĝo de ideo, de apliko de filozofio, tiu de monda solidareco, de la komunigo de niaj havaĵoj por ke ili estu pli juste redisdonitaj.

Tiu civitana elekto povas esti nur individua klopodo. Ĝi koncernas ĉiujn, kiuj tra la mondo indignas pro la neegaleco de homoj rilate al la fundamenta rajto sin nutri. Ĝi koncernas ĉiujn malfavorigitajn, kiuj deziras taski al si kaj mem decidi sian estontecon. Ĉiuj kapablas, se ili deziras tion, partopreni en la solidareco inter homaj grupoj, inter individuoj per aliĝo al la farmaniero de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato.

Tiu aliĝo al MSM povas preni formon de bonvoleco, doni sian tempon kaj energion en la regado de la asocio, sed tio ne ekskluzivas la alian aproban formon, kiu estas la mona partopreno, ĉar ĉi lasta ebligas al homoj, ofte en malfacileco ie sur la planedo, ellabori projekton, kiu plifaciligos siajn vivkondiĉojn. Tiuj homoj mem pruvis sian solidarecon paginte almenaŭ dum du jaroj sian parton en la komuna kaso. Poste, kiam ilia projekto atingos deirpunkton, ili povos per reciprokeco, plu partopreni en tiu solidareco el kiu ili profitis.

Sen ĉies mona partopreno MSM ne kapablas interveni ĉe siajn aliĝintojn. Ĉar la financadoj entenas la subvencion de duono, necesas reprovizi la kason. La pruntaj repagoj estas ankaŭ nepre necesaj, sed ili plenigas nur duonon de la elspezita financado de la projekto.

Enhavo

Gravas la kotizo !.....	p. 1
Volontuloj bezonataj.....	p. 2
Vojoj de la solidareco : traTogolando.....	p. 3
Tra Burkinio	p. 3-4
Eĥoj el la Admministra Konsilantaro.....	p. 5
Gratulojn al la grupo Espero.....	p. 8
Pri la adreso de la kasisto.....	p. 8
Kolofono.....	p. 8

Ĉiu kotizas laŭ siaj monrimedoj. La kotizoj de tiuj, kiuj atendas financadon, de tiuj kiuj jam profitis el ĝi, la kotizoj de ĉiuj, kiuj volas pli justan kaj pli solidaran mondon, estas esencaj por plu antaŭeniri.

Tio eble estas malmulta, sed rememoru pri la muŝbirdo, legendo kara al Pierre Rabhi, kiu dum arbara brulego aktivis sin por verŝi sur la fajron la kelkajn akverojn, kiujn entenas ĝia beko. Primokita de la aliaj bestoj, ĝi respondis « mi scias, sed mi plenumas mian parton ».

Kaj se ĉiuj plenumas sian parton ...

Danièle Charier

Volontuloj bezonataj דרושים מתנדבים Volontieri necessari vapaachitoisia 자원 봉사자 필요 εθελοντων που απαιτουνται необходимо добровольцев Se necesitan voluntarios مطلوب متطوعين Volunteers needed વિષયસર્વિ આવશ્યક Freiwillige benötigt ボランティア必要 frivillige trengs gönüllüler

Ni serĉas volontulojn !

Ni bezonas plifortigi nian administran teamon por daŭrigi la vivon de la asocio kaj komenci ankoraŭ pli da iniciatoj.

- ☞ Ĉiu homo, kiuj pridisponas doneblan tempon kaj deziron helpi kaj kontribui en la senlima solidareco de MSM estas invitata kuniĝi al ni.
- ☞ Ne necesas antaŭan klerigon; temas kuniĝo kun teamo, kiu funkcias kaj kiu havas multajn projektojn.
- ☞ Laboraĝuloj, emeritoj, studentoj ... ĉiu el niaj bonvolemuloj havas malsaman identecon. Ilia memdevontigo estas aŭ daŭra aŭ portempa.
- ☞ Laŭ viaj deziroj, viaj kompetentecoj, vi povos partopreni en la administra subteno, en la pluzorgado de niaj solidarecaj projektoj, en la animado de la sociaj retoj, en la klopodado ĉe la diversaj informedioj, en la lanĉo de novaj iniciatoj, en la traserĉado de mono por ke niaj malgrandaj aŭ grandaj projektoj ofte atendantaj manke de monprovizo, povu konkretiĝi.

Vi mem elektu vian partoprenmanieron laŭ via disponebleco ! Kompreneble viaj proponoj bonvenas !

Sendu al ni retmesaĝon aŭ poŝtan leteron por doni viajn nomon, telefonon kaj loĝlokon. Ni rapide rekontaktos vin.

Esti volontulo ĉe MSM signifas esti koncernata kaj deziri vere partopreni en la vivo de asocio kiu provas certigi la prinutran memsufiĉon de niaj bezonhavaj membroj.



John De La Cruz



Brutaro gardata de Fulboj (sahela nomada gento)

La vojoj de solidareco pasas tra Togolando ...

En Togolando, en Agou, la grupo **FIDES**, kiu projektas kaprinan bredadon ĵus ricevis la duan parton de sia financado.

La grupoj **DJIFA** kaj **AMENOUVEVE**, en la distrikto Malalta Mono (Apudmara Regiono), baldaŭ ricevos la unuan parton de sia financado. Temas pri la financado, respektive, de produktado de maizo kaj manioko, kaj projekto de transformado de manioko en fekulon (« gari » laŭ la loka nomo)

... kaj tra Burkinio

Dum sia restado Edwige Geniteau, administrantino, kune kun Bakary Ouattara, prezidanto de PKB (Pluzorga kaj Kunordiga Buroo de MSM) dialogis kun la responsantoj kaj membroj de la grupoj aliĝintaj al MSM. Dum la interŝanĝoj oni rememorigis pri la pago de la kotizoj kaj la nova slipo de prezentado de la projektoj estis eksplikita.

La Bobodiulasaj grupoj :

- **Gnogondeme** kaj **AFDES** donis la dosierojn de la projektoj de grenejo ; poste tiuj estis prezentitaj dum kunsido de la Federacia Administra Konsilantaro kaj deklaritaj « elekteblaj ».
- La asocio **Ste-Marie-Reine** informis pri la malfacilaĵoj, kontraŭ kiuj la grupoj staris, kaj prezentis sian programon de asocia rekonsistigo.
- La inoj de **Benkadi en Sarfalao** por kiuj la projekto de transformado de fazeolo en lokajn manĝaĵojn estis financita en novembro 2013, baldaŭ repagos la unuan parton de la prunteprenon.
- La prezidantino kaj la kasistino de la grupo **Sababougnouma**, kies projekto de saporfabrikado estis financita en aŭgusto 2014, detale pruvis la konforman naturon de la uzado de la ricevita mono.
- **Espero**, grupo kiu praktikas la grasigon de bovoj kaj ŝafoj, repagis la tutan prunteprenon, kaj tio laŭ la proponita pagkalendaro.
- **Miriyagnouma** en Yeguere : tiuj inoj havas la projekton komercigi grenojn. La redaktado de la dosiero estas komencita.
- La ina grupo **Solidareco** estis afliktita pro la forpaso de sia prezidantino fine de januaro de tiu jaro.



Benkadi en Sarfalao kaj Edwige Geniteau

La Burkinaj grupoj ekster Bobodiulaso :

- La gea grupo **Badedeme** en Panamaso ankaŭ estis afliktita en 2014 pro la forpaso de du samfamilianoj el siaj membroj.
- Renkonto okazis en Bobodiulaso kun la prezidanto de **Kiemere** el Dingaso.
- La inoj de **Toyow** kaj la viroj de **Yankadi** en Padema, kiuj havas la projektojn fabriki kaj komercigi sapon el karitea butero, kaj la kultivi maizon estas enskribitaj en la financtabelo por 2015.
- **Signignansigui** el Dodougou, financita en decembro 2012 por la aĉeto de grenmuelilo, povis komenci sian aktivecon nur en marto 2014 pro la malbona kvalito de kelkaj mekanikaj pecoj. Post bona ekfunkciado konstatita laŭ la enspeza libro, problemoj ekaperis (neregula funkciado de la muelilo pro la forestemo de la muelisto, paneoj pro rompitaĵoj aŭ eluzitaj pecoj). Nova farmaniero estis aranĝita en februaro, kaj bilanca punkto estos farita post unu monato kune kun Bakary Ouattara.
- Interŝanĝoj kaj kontaktoj okazis ankaŭ per telefonaj alvokoj kaj mesaĝoj por **Benkadi** de Dufigujo, ina grupo en vilaĝo je 30 km de Bobodiulaso, **Pefuru-3** en Bare, **Modjibedji** en Samogohiri.



En la Vagadugua areo, interŝanĝoj inter Edwige Geniteau, Bertrand Kissou korespondanto, kaj Symphorien Meda, regiona Delegito provizis la jenajn informojn :

- **Wend Panga de Wati Nooma**, la membroj de tiu gea grupo baldaŭ redaktos sian projektan dosieron. Bertrand Kissou donis al ili la necesajn informojn.
- **Song Kiiba** : Bertrand Kissou renkontis la prezidanton.
- **Tind Manegre en Malgranda Samba**, la grupo bone fartas.
- **Wakogldo en Rimkeita**, la membroj devas ĝisdatigi sian projektan dosieron por ke ĝi estu pristudata dum kunsido de la Federacia Administra Konsilantaro ;
- **Relwende en Ziro** baldaŭ repagos la saldon de la pruntepreno konsentita de MSM. Symphorien Meda korespondas pri tio.



Funkciado :

- Koncerne la pripenson pri la parto de subvencio restarigota aŭ ne por la financado de projekto, la plimulto de la esprimitaj voĉoj elektis por reveno al 50 % per pruntedono kaj 50 % per subvencio.
- MSM en Sokode (Togolando) La Administra Konsilantaro komisiis Symphorien Meda por renkonti la aliĝintojn de la regiono kaj relanĉi la agadon de MSM.

La projektoj

- La Pluzorga kaj Kunordiga Buroo de MSM en **Benino** sendis agadan raporton. Kvin novaj grupoj deziras aliĝi al MSM, nome Mahudagba, Esther, Mahueyna, Essolagnon kaj Gbenonkpo.
- la grupo **Ayidjedo** ricevis la unuan financoparton por starigi kaj aranĝi tenejon de manĝovaroj.
- Edwige Geniteau restadis en **Burkinio**, kie ŝi renkontis multajn grupojn. Inter ili **Espero** repagis sian tutan prunteprenon faritan por projekto de bova grasigo ; **AFDES** prezentis projekton de grentenejo, kiu estis deklarita « elektebla » kun la numero 15.01.BF kaj **Gnongondeme**, kiu prezentis en 2010 projekton n-ro 10.05.BF – projekto, kiun la cirkonstancoj kondukis al nova redaktado – proponis novan projekton, kiu ricevis la numeron 15.02.BF.
- En **Togolando**, la grupoj **Djifa** kaj **Amenouveve** ricevos la unuajn financopartojn por la kultivado de maizo kaj manioko por la unua kaj por la transformado de manioko en fekulon kaj tapiokon por la dua.

Animadoj :

- La Mondcivitanoj en Poitou-Charentes aliĝis al la reto RESODI (internacia solidareco)
- Marŝo por la Paco kaj la Frateco okazos en Mulhuzo la 14an de junio 2015. MSM subtenas tiun iniciaton.
- La publika parto de la retejo www.globidar.org finfine estos baldaŭ renovigita.

Globidar





Gratulojn al la membroj de la grupo Espero en Bobodiulaso, kiu salde repagis la tutan prunteprenon respektante la pagkalendaron skribitan en la solidareca kontrakto. Ili sukcesis konduki per strikta rigoro kaj malgraŭ la malfacilaĵoj sian projekton de bova grasigo.

La Administra Konsilantaro gratulas ilin nome de ĉiuj globidaranoj.



Burkinio : Azenino kaj ties ido

INFORMCELE !

Por eviti kostojn de transsendado kaj perdon de tempo, ni petas vin sendi viajn kotizojn donacojn kaj abonojn rekte al la Kasisto :

Daniel Durand

« Les Nids »

49190 Saint-Aubin de Luigné (France)

Letero de leganto

El Monda Solidareco n-ro 112 plej interesis min la artikoloj de Danièle Charier pri Ebola kaj de Daniel Durand pri la klimata ŝanĝiĝo. Koncerne ĉi lastan mi rekte vidas la minacon super mia naskiĝurbo « Kalima », kiu estas minacata de erozio kaj neniu maltrankviliĝas. De kelka tempo mi pripensas pri projekto de plantado de arbidoj en neloĝataj kaj neokupataj lokoj. Mi jam komprenis, ke se oni volus konscienci la homojn planti arbidojn ĉe si, neniu sin interesus pri tio pro la ĥaosaj soci-ekonomiaj kondiĉoj de post la bankroto de la SOMINKI. La agado estus instigado responde al la konduto de homoj, kiuj ne fidus simplan parolon.

La plej granda problemo, kiun konas nun la homaro sur tiu Tero, kiu estas nia patrolando, estas vidi, ke kio trafas homon alian ol min tio ne interesas min kaj neniam trafos min. Mi samopinias kiel Danièle Charier kiam ŝi diras « Eble ankoraŭ estas tempo ekkonsci, ke kio tuŝas parton, eĉ etan, de la homaro, tio tuŝas la tutan homaron, kaj ke ni estas la loĝantoj de unu unika planeda vilaĝo ». Ĉiel ajn ni plu metu nin je la servo de aliaj ; el tio profitos kaj ni la servantoj kaj ili la servatoj.

Same kiel la homa korpo, ĉiu organo havas sian rolon kaj ni devas senti nin koncernataj de ĉio okazanta tra la mondo, ĉar ni estas nur unu korpo. Frate.

Alfonso el Goma, Kongio

monda solidareco estas bulteno eldonata de **Monda Solidareco kontraŭ la Malsato**

JE VIA DISPONO :

- Aliĝiloj
 - Flugfolioj pri projektoj
 - Pliajn bultenojn
 - Federacia Reglmento de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato
 - Afiŝetoj (A3-formato)
- Bonvenas partopreno en la sendokosto (3 € aŭ pli)*

Nur por Eŭropo :

- Blankaj ĉemizetoj : 20 € - trikoĉemizoj 15 € kun la emblemato « *Fonds Mondial* ».
- Kovertoj DL (11 cm x 22 cm) « *Solidarité Mondiale contre la Faim* » + emblemato : 6 € por 100 + sendokosto : 3 €
- Fotoj paperaj aŭ elektronikaj.

Se vi konstatas malfruigon en la liverado (aŭ forgeson !) vi bonvolu fari al ni amikan realvokon ! Antaŭdanke.

KOTIZOJ - DONACOJ - ABONOJ - MENDOJ : Kiel pagi ?

☞ per franca ĉeko al **Globidar**

☞ per poŝtaj rimedoj, je la nomo de :
SMF- MONDA SOLIDARECO
(PĈK-CCP PARIS 10.734.96 Z)
RIP:
FR21 2004 1000 0110 7349 6202 056

☞ per banka karto aŭ **PayPal** tra la retejo www.globidar.org

☞ ankaŭ per monbiletoj enŝovitaj en ordinaran koverton.

☞ UEA kontoj : **mfsk-g**

Librotenado je la sama adreso kiel la bulteno

Sur la adresetikedo de la koverto aperas la proksimuma dato de via lasta financa partopreno. Vi bonvolu kontroli ĝin !

RICEVITAJ KOTIZOJ kaj DONACOJ

Januaro 2015	1004 €
Februaro 2015 :	459 €
Marto 2015	737 €
Aprilo 2015	1902 €

MONDA SOLIDARECO estas eldonita en Esperanto, kaj franca lingvo.

Jara abono : 5 €

Redakcia komitato : Alain Bal, Danièle Charier, Daniel et Odile Durand, Hotto Abdoulaye,
Fotoj el la fototeko de MSM
Emblemo : Yamsina Sahraoui
Elfrancigis Daniel Durand,
Kontrolis (ne)

Directeur de la publication : Daniel Durand
CPPAP n° 0410 G 86482.
Imprimerie de l'association.
Tel : +33 (0)241 78 47 75
info@globidar.org
www.globidar.org

MONDA SOLIDARECO

Les Nids

FR 49190 St-AUBIN-DE-LUIGNE

Francio